

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1382 (9) | septembro 2023

La 74-a IFEF-Kongreso en Antverpeno
plene sukcesis | 174

Landa agado en la Universala
Kongreso | 180

Ŝviti aŭ
ne ŝviti, jen la demando | 182

Abunda Hibrida Scienca programo
en Torino | 184



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitriĵ Ševĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbek
Kovrilpaĝa foto: Rogener Pavinski

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044

<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Generala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimуме €20,00). Menu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



174

La 74-a IFEF-Kongreso en Antverpeno plene sukcesis


En majo 2023 okazis, jam por la kvara fojo, belga IFEF-kongreso, ĉi-foje en Antverpeno. Ĉeestis la kongreson ĉirkaŭ 100 homoj el 14 landoj.



180

Landa agado en la Universala Kongreso

Kie la kontinenta komisiono estas malforta, UEA kaj Esperanto estas malforta. Siavice la kontinentaj komisionoj ekzistas kaj agas per siaj landaj asocioj.



182

Ŝviti aŭ ne ŝviti, jen la demando

Nepras paki sunprotektan kremojn por la haŭto, ĉapon kaj sunokulvitrojn. Enmana ventumilo povas helpi.



184

Abunda Hibrida Scienca programo en Torino

Ĉiuj prelegoj okazis hibride kaj estis registritaj. Laŭplane ili estos spektablaj en la Virtuala Kongreso en novembro kaj en la jutuba kanalo de UEA, UEA-Viva. La plimulto de la prelegoj estis ankaŭ anoncitaj en Eventa Servo kaj diskonigitaj en la UEA-retlistoj.

Malferme | **Universala Kongreso** | 171

Komentoj de s-ro G. C. Fighiera por prezento en la Fermo de la 108-a UK

Rezolucio de la 108-a UK | 172

Universala kongreso | 173

Mia vojaĝo al la 108-a UK kaj la 79-a IJK

Laste Aperis | 176

Universala Kongreso | 177

Bunta kaj abunda

Belartaj Konkursoj | 178

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2023

AMO | 179

AMO ĝis 102, EKO ĝis 48

Universala Kongreso
Esperanta teamo de TEFA venkis per 6-3

Landa agado | 183

Esperanto-informbudo ĉe la Zamenhof-monumento en Herzberg

Universala Kongreso | 185

Bunta kaj altkvalita 45-a Esperantologia Konferenco

Evento | 186

EKRA – 2023

Esperanto-tago | 187

Ne en unu tago elkreskis Kartago

Enketilo pri UEA

Opinio | Kongresa temo | 188

Kiam Zamenhof revis helpi migrantojn

Universala Kongreso | 189

Ekskursa Kongreso

UEA | 190

12 diplomoj pri Elstara agado kaj Elstara Arta Agado

Forpaso | 191

Estraro

Prezidanto: D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsah, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Perfeccion 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel (Sciencia kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Generala Sekretario: S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj

kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Postel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timisoara, Rumanio
Postel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng (Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Postel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Postel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsseo Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matušov kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



Komentoj de s-ro Gian Carlo Fighiera preparitaj por prezento en la Fermo de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, Torino, la 5-an de aŭgusto 2023

 Gian Carlo Fighiera

S-ro Fighiera, torinano, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA en la 1950-aj jaroj, estis multrilate la arkitekto de la modernaj Universalaj Kongresoj. Dum sia restado en Varsovio en 1959, prepare al la Universala Kongreso, la 44-a en la serio, li renkontis Ada Sikorska, kiu fariĝis lia edzino. Ada Fighiera-Sikorska dum multaj jaroj redaktis la revuon *Heroldo de Esperanto*. S-ro Fighiera sekvis karieron en la internacia turismo. Ada forpasis en 1996. La 94-jara s-ro Fighiera intencis saluti la ferman kunvenon de la kongreso, sed estis malhelpata de malsano.

Alvenis la momento, kiun ni time atendis kaj mense forpuŝis dum tuta semajno, la momento de disiro kaj de reveno al niaj ĉiutagaj taskoj.

En mondo, kie pli ol mil stratoj, placoj kaj monumentoj honoras Esperanton kaj ĝian iniciatinton (ankaŭ en Torino), kie la eŭropa urbo Herzberg alprenis la nomon de nia lingvo, kie Esperanto dufoje estis agnoskita de Unesko kaj centmiloj da paĝoj en interreto atestas pri ĝi, tro multaj personoj plue nutras antaŭjuĝojn kontraŭ ni.

Malgraŭ ili, dum tuta semajno ni, per nia kunvivado en Torino, konfirmis ke tutmonda socio povas frate kaj pace konekzisti, interkompreniĝante per sama lingvo, defendante la principon de egaleco de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj. Per tio ni plenumis la revon de la humanismaj

filozofoj kiel Descartes, kaj firme partoprenis en la moderna batalo de Unuiĝintaj Nacioj (vidu artikolon 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj) kontraŭ la lingvaj diskriminacioj. Tiun vojon ni estontece frate sekvos por la bono de la homaro, ĝis maturiĝos la historia momento de ĝia universaligo.

Ni, plenaĝuloj, mem spertis en nia vivo kiom flume la historio progresas, malgraŭ ŝanceliĝoj kaj eraroj. Mi memoras ke antaŭ kelkaj jardekoj – kiam mi estis infano – televido, komputilo kaj kreditkartoj ne ekzistis; tamen tiuj revoj realiĝis sub niaj okuloj.

Socia progreso etendiĝas tra jarcentoj, ankaŭ rilate Esperanton. Nenia forto povas haltigi ĝin.

La vivo donos al ni aliajn okazojn renkontiĝi.

Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

La 1 318 partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia

lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.

2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvin-

kitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, proklamitan en la jaro 1948.


6. Nun, en la jaro de la 75-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023



Vi daŭre povas elŝuti la kurieron de la 108-a UK La Taŭra Voĉo kaj aliajn materialojn:
<https://uea.org/pdf/uk2023>



Mia vojaĝo al la 108-a UK kaj la 79-a IJK

Mulele Mbassa



Antaŭ ol ekvojaĝi al Italio, mi renkontis multajn defiojn, kiujn ne estis facile por mi mem venki sen helpo de esperantistaj geamikoj, ĉar la vojaĝo eksterlanden postulas havi necesajn dokumentojn: tiuj ĉi inkluzivas pasporton, sanasekur-karton, vakcinan karton kontraŭ la flava febro, geedziĝateston, bankajn konteltirojn.

Antaŭ mia vojaĝo mi preparis min por havi la dokumentojn, sed mankis al mi la bankajn konteltirojn kaj mi iris al mia loka administracia domo por peti leteron de ekzekutivo de loka administracio por konigi min, ke mi estas simpla kultivisto, kiu ne posedas bankokonton. Post tio mi petis rendevuon ĉe la Itala ambasadejo por akiri la vizon, kiu permesos al mi vojaĝi al Italio. La 10-an de julio 2023, mi iris al la Itala ambasadejo por peti la vizon, tie mi donis miajn dokumentojn kaj post momento oni rifuzis mian peton pro manko de banka konteltiro. La servisto de la ambasado ne atentis eĉ la leteron de mia loka ekzekutivo kiel atestilon!

La fakton mi informis al mia kara prof. Francesco Maurrelli, kiu multege strebis zorgante por mia vojaĝo al Italio plena je amikeco, eĉ amo, kaj certe reagis en ĉiu minuto kun garantio, ke mi ne maltrafu la ŝancon partopreni la UK-on.

Finfine mi ricevis la vizon, unu tagon antaŭ mia forflugo al Italio!

La 27-an de julio 2023, je la 5:55 vespere mi kun s-ro Mramba Simba forflugis per la flugo de Etiopia aerlinio de Daresalamo al Adis-Abebo. Denove ni flugis de Adis-Abebo je la 12:15 al Malpensa Milano kaj atingis la flughavenon de Milano je la 5:50 frumatene. De Milano ni vojaĝis aŭtobuse al Porta Susa, kie ni elbusiĝis. Post momento nia kara Francesco Maurrelli akceptis nin surloke! Kiom da ĝojo mi havis! Tio superas mian esprimopovon! Post salutado kun brakumado, li akompanis nin en jam rezervitan ĉambron por ni. Danke al bonaj lokaj trafikiloj, kiuj estas bone aranĝitaj tiel, ke ni ne perdiĝis survoje!

Dum la kongresa semajno certe mi ĝojis, eĉ malkovris multon. Tio ĉi inkluzivas ĉarmegan akcepton de ni, interkonatiĝon kun novaj geamikoj, gajajn paroladojn kun geamikoj en la sama lingvo, la komunan manĝtablon kaj buntajn programojn ktp.

La fakto, kiu ne estas refutebla, estas ke la lingvo Esperanto unuigas homojn de ĉiuj nacioj kaj tiuj fariĝas unu Esperanto-familio, laŭ idealo de D-ro L.L.Zamenhof.

Fakte, mi ne sentis min sola kaj fremdulo dum la kongresa semajno, kvankam estis mia unua fojo ĉeesti ti-

an grandan kongreson kiel familiano de Esperanto-parolantoj. Verdire multaj aferoj ŝajnis al miaj okuloj strangaj, sed mi mem ne troviĝis fremdulo antaŭ miaj Esperanto-geamikoj en Torino, kaj tiel mi kuraĝis gaje paroli kun ĉiuj, inkluzive la pasintajn kaj nunajn gvidantojn de UEA.

Mia ĝojo same kiel tiu de miaj samkontinentanoj (afrikanoj) ĝojpleniĝis dum la Solena Fermo de la 108-a UK, kiam UEA kaj LKK pretis transdoni la Esperanto-flagon al Tanzania reprezentanto, kiel fidindan signon por kongresumi en la lando. Tio estas unika historio de Universala Kongreso de Esperanto transiri en Afrikon kaj estas gratulinda decido!

Post la Universala Kongreso mi aliĝis kaj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Lignano Sabbiadoro. Pro la kondiĉo de mia vizo resti en Eŭropo, mi devis forlasi la kongresurbon de la IJK la 9-an de aŭgusto 2023. Unue mi vojaĝis per aŭtobuso al Lacinna, de tie per trajno al Trieste, kie ni prenis flugon al Romo.

Fine mi elkore dankas ĉiujn geamikojn enlande kaj eksterlande, kiuj helpis min por mia partopreno de la UK kaj IJK en Italio!



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

La 74-a IFEF-Kongreso en Antverpeno plene sukcesis

■ Yves Nevelsteen

En majo 2023 okazis, jam por la kvara fojo, belga IFEF-kongreso, ĉi-foje en Antverpeno. Ĉeestis la kongreson ĉirkaŭ 100 homoj el 14 landoj.

La organiza teamo (LKK, Loka Kongresa Komitato) pretigis ampleksan kongreslibron kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso. La partoprenantoj antaŭe ricevis ĝin per retpoŝto, kio multe helpis por prepariĝi al la kongresa semajno. Paperan version ĉiu ricevis surloke, en bonkvalita kongresa sako, en kiu troviĝis krome kelkaj frandaĵoj de la antverpena regiono.

La malfermo okazis en la urbo-centro, en bele ornamita salono de alternejo. Ĉeestis du gravaj politikistoj kun respondecokaj kiuj vere rilatis al la temo de la kongreso: daŭripova evoluigo kaj transporto. Unu el ambaŭ politikistoj eĉ diris frazon en Esperanto kaj ĝin prononcis sufiĉe bone! Estis abundo da manĝetaĵoj kaj trinkaĵoj; Nicky Janssen tion tre zorge pretigis kun sia teamo de helpantoj. Impresis la tradukado: foje oni montris tradukon sur ekrano, foje oni interpretis, kaj la LKK-prezidanto Kristin Tytgat flue saltis de unu lingvo al la alia. Talentdotita juna pianistino ornamis la inaŭguron muzike. Ŝi ankoraŭ studas, sed tamen tre impresis nin.

La diversaj prelegoj kaj prezentoj estis tre altnivelaj. Okazis kaj fakaj pre-

legoj de IFEF kaj prelegoj pri ĝeneralaj temoj. La du ĉefprelegojn prizorgis Ella Strug, pri "Stacidomoj en Belgio/Antverpeno: arkitekturo kaj kultura fono", kaj Vladimir Ronin – pri "Historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento". Ambaŭ prelegantoj dum la kongreso profesie ĉiĉeronis en la centro de Antverpeno. La partoprenantoj povis elekti inter du celoj: aŭ la historia urbocentro aŭ la belega stacidomo.

Dum la IFEF-kongreso en Antverpeno kunvenis anoj de la Erasmus-projekto VERDEN. Kadre de tio Lars Sözuër prezentis la VERDEN-subpro-



jekton VeloRelo. Krome okazis interalie prezento de Yves Nevelsteen pri la evento-diskoniga retejo Eventa Servo kaj ateliero de Johan Van Eenoo pri la fretocitro. Ivo Durwael gvidis dum la kongresa semajno konversaciigan kurson samtempe por komencantoj kaj progresantoj.

Dum la Flandra Vespero, la muzikistoj Bernard Van Lent kaj Lief Verbeeck prezentis diversajn specojn de muziko: parizan "musette", judan "klezmer", nostalgian balmuzikon, prop-



rajn komponaĵojn aŭdigatajn per diversaj instrumentoj: akordiono, violono kaj tre malnova instrumento: la vjelo. Lode Van de Velde sprite prelegis pri Antverpeno surbaze de la "mapo de la urbocentro de ĉiuj urboj de Eŭropo". La mikso de rakontoj kaj belaj bildoj pri la historio de Antverpeno kaj Flandrio kun tipa loka muziko estis interesa kombino. Multe da talento sur la scenejo!

La Kulturan Vesperon prezentis rusa duopo, junaj studentoj de la brusela konservatorio. La publiko forte aprezis la koncepton de la vespero: mikson de klasika muziko kun deklamado de poemoj fare de Anne Brabant.

Ĉiuj partoprenantoj tre ŝatis la fakekskurson al la trajnomuzeo Train World en Bruselo. La enhave riĉa broŝuro, zorge kunmetita de Nikolao De Buyl de la brusela grupo, estis vera pluso. Spite al lastminuta problemo kun iu tramlinio, la partoprenantoj finfine





glate atingis la kongresejon. Pluvigis dum la ekskurso; la pluvjako, donaco de la urbo, estis tre bonvena por fronti la “belgan veteron”.

La konata duopo Saša Pilipoviĉ kaj Georgo Handzlik regalis la partoprenantojn de la 74-a IFEF-kongreso per surscenigo de la amuza kabaredo “Mi diros al vi sekrete...”. Verda Banaĵo verŝajne estas la sola teatro en la mondo kies aktoroj loĝas pli ol 1000 km for unu de la alia. La teatraĵo estis plene plena je Esperanto-kulturaj referencoj.

La tuttaga ekskurso iris per buso. Matene okazis vizito al la impona antverpena haveno kun loka ĉiĉeronino. Estis multe da entuziasmo, ne nur inter eksterlandaj ekskursantoj. Kelkaj flandroj finfine malkovris la havenon kaj ĝiajn perlojn kiel ekzemple la havenvilaĝo Lillo. Tre fascinajn. La buso veturo ne estis senproblema: foje pro malfermita ponto, foje pro tro malaltaj tuneloj. Ni kune konstatis, ke Antverpeno estas denstrafika regiono, kiel bele vortumis tion nia ĉiĉerono Paul De Cooman.

Pantagmanĝo estis provizita en la Kanada-Pola Militomuzeo en Adegem (honore al la liberigintoj de la regiono fine de la Dua Mondmilito). Poste ekde la stacidomo de Maldegem ni veturis per trajno tirata de vaporlokomotivo, sur mallarĝa ŝpuro laŭ la antaŭa trajnlinio Maldegem – Bruĝo. Vizito de la muzeo fermis la tuttagan ekskurson.

La organiza teamo pretigis surprizon por la IFEF-prezidanto Rodica Todor okaze de ŝia naskiĝtago kaj por

danki ŝin pro multjara engaĝiĝo por la fervojista Esperanto-movado. Dum la adiaŭa vespero la LKK regalis la partoprenantaron per tortoj kun la portreto de la prezidanto kaj kadrita foto de la IFEF-estraro farita dum la kongreso mem antaŭ la kongresa flago.

En salono de la kongresejo, Gerd Jacques de la Flandra Esperanto-Ligo prizorgis libroservon. Esperantaĵojn eblis aĉeti ankaŭ dum la ekskursoj al la Esperantocentro.

La partoprenantoj aprezis la tre bonkvalitajn kaj bongustajn manĝojn en la kongresejo. Dum la adiaŭa vespero la LKK laŭdis la kuiriston. La etoso de la kongreso estis ĝenerale tre

bona kaj estis harmonia kunlaboro inter la LKK-anoj, kion la partoprenantoj rimarkis. Tion atestas la komuna kongresa fotaro; bela maniero por postĝui la eventon. Intertempe pli ol 500 fotoj de pli ol 10 malsamaj fotintoj troviĝas en tiu fotaro: <https://mallonge.net/ifef23fotaro>. La LKK de la kongreso tre ĝojis ankaŭ pro la kunlaboremo de esperantistoj de la tri belgaj regionoj: esperantistoj el Flandrio, kiuj organizis la ĉefkongreson, la brusela grupo, kiu multe helpis dum la fakekskurso, kaj la valonaj esperantistoj, kiuj respondicis pri postkongreso. Efektive post la ĉefkongreso sekvis turisma postkongreso en Valonio, la suda parto de Belgio. Oni interalie vizitis la “Bois du Cazier”, lokon kie okazis grava mineja tragedio, la mezepokan citadelon de Namur kaj la ŝiplifton de Strépy-Thieu.



Laste Aperis

Beletra Almanako 46 (Februaro 2023).

Red. P. Daŝgupto, I. Ertl, J.L. Jacobsen, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay. Novjorko: Mondial, 2023. 139p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN 9781595694508/19373325. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), teatro, artikoloj, eseoj, recenzoj. € 11,40

Diĉionar român-esperanto. Mariana Pitar kaj Florica Popa, kunordigantoj. Timișoara: Editura Universității de Vest, 2022. 334p. 20cm. ISBN 9789731259543. Unudirekta vortaro kun konciza prezento de la gramatiko de Esperanto. € 21,00

Ekster la limo. Apokrifoj esperantigitaj de Gerrit Berveling. En Esperanton trad. G. Berveling. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023. 138p. 20cm. ISBN 9788088326427. Fragmentoj el diversaj kristanaj verkoj. € 11,70

Esperanto por mi. Red. Hori Jasuo. Maebaŝi: Horizonto, 2023. 16p. 30cm. ISBN 9784939088643. Unupaŝaj prezentoj akompanataj de kolora foto kaj nigra-blanka desegnaĵo. Sesa kajero. € 5,40

Esperantologio / Esperanto Studies. Nova Serio / New Series 4 (12). Red. Guilherme Fians, Klaus Schubert. Rotterdam / New York: CED / Mondial, 2023. 135p. 24cm. ISBN/ISSN 9781595694515/13113496. Kontribuadoj de Mark Fettes, Sabine Fiedler, Grant Goodall, Patience Haggin, Klaus Schubert, Otto Prytz, Kimura Goro Christoph, Carlo Minnaja, Christopher Gledhill, Ulrich Lins, Alessio Giordano, Gotoo Hitosi, Ida Stria. € 19,20

Granda Esperanta-litova vortaro, La / Didysis esperanto-lietuvių kalbų žodynas. Petras Čeliasukas. Kaunas: Pasaulio lietuvių centras, 2023. 807p. 22cm. Bind. ISBN 9786098167849. Ampleksa unudirekta vortaro, kun ĉ. 52 000 kapvortoj. € 30,00

Kiel naskiĝas nova sperto – De teorio al praktiko. Mihai Trifoi. Sfântu Gheorghe: Eurocarpatica, 2023 (2-a eld.). 214p. 21cm. Kolorilus. ISBN 9786068851808. Pri la spertoj de la aŭtoro kiel instruisto de Esperanto, plus tekstoj de aliaj pri li. € 21,00

Konstruado-kajero 2022. Jara revuo de TAKE. Red. Pierre Grollemund. Win-

tzenheim: TAKE, 2022. 79p. 21cm. Kolorilus. Artikoloj rilataj al konstruado kaj arkitekturo. € 14,10

Konstruado-kajero 2023. Jara revuo de TAKE. Red. Pierre Grollemund. Wintzenheim: TAKE, 2023. 76p. 21cm. Kolorilus. Diverstemaj artikoloj rilataj al konstruado kaj arkitekturo. € 14,10

Lando kiu vekigis. Rakontoj el Ukrainio. Kalle Kniivilä. Novjorko: Mondial, 2023. 169p. 22cm. ISBN 9781595694522. Libro pri Ukrainio kaj ukrainoj, kiuj ne volas esti "liberigataj" de la "Granda Frato". € 19,20

Leoneto, Museto kaj aliaj. Vika Pipina. En Esperanton trad. S.V. Smetanina. Moskva: s.e, 2023 (3-a eld.). 28p. 21cm. ISBN 9785604873984. Plene ilustrita kolekto de rakontetoj pri la amikeco de la juna aŭtorino kun bestoj. € 7,80

Mi vivas en la mondo malperfekta. Mikaelo Bronŝtejn. Lublin: Ars Libri, 2023. 509p. 24cm. Bind. ISBN 9788363698942. La rusia bardo kun barbo verkas poezion de 55 jaroj! El la rikolto de tiu pli ol duona jarcento li elektis la kremon kiu povas prezenti lin "kiel Esperanto-poeton pli-malpli impone". € 51,00

Mia vivo kun Esperanto. Petr Chrdle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023. 236p. 23cm. Ilus. ISBN 9788088326410. Membiografio de unu el la ĉefaj motoroj de la ĉeĥa Esperanta movado. € 14,70

Novaj esploroj pri vivo ekstertera: eksterplanedoj, NIFOJ kaj SETI. Amri Wandel. s.l.: la aŭtoro, 2023. 24p. 21cm. Kolorilus. Teksto de prelego prezentita dum la Internacia Kongresa Universitato 2023. € 7,50

Okulvitroj de Lidia, La. Aitor Arana. Lublin: Ars Libri, 2023. 203p. 22cm. Bind. ISBN 9788363698997. "... romanigita vivo de Lidia Zamenhof, grandparte bazita sur realaj eventoj kaj helpe de materialoj kaj pensoj de Lidia mem". € 21,00

Pordo de la felico, La. Gafur Mirzo. Taŝkento: Nurafshon business, 2023. 62p. 20cm. ISBN 9789943923652. Kolekto de poemoj, prozaĵetoj, eseetoj. Kun iom da fotoj. € 9,00

Raportoj el Japanio 26. Jasuo Hori. Maebaŝi: Horizonto, 2023. 281p. 21cm. Ilus. ISBN 9784939088612. Raportoj kaj korespondadoj pri temoj naciaj kaj internaciaj. € 18,90

Reĝo Ubuo. Alfred Jarry. En Esperanton trad. Th. Larger, Th. Tailhades. Paris: Espéranto-France, 2023. 109p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 62. ISBN 9782957896134. Farso, inspirita de la ŝekspira *Makbeto*, en kiu la franca avangarda aŭtoro ridindigas potencavidon kaj tiranecon. € 10,50

Rigardo paca kaj harmonia al nia planedo. Omraam Mikhaël Aïvanhof. El la franca trad. teamo. Fréjus: Prosveta, 2023. 17p. 21cm. ISBN 9782818405376. Eltiraĵoj el la pli ampleksa *La homo, konkere al sia destino*. € 2,10

Ruta Tannenbaum. Miljenko Jergović. En Esperanton trad. T. Chmielik, J. Pleadin. Lublin / Đurđevac: Ars Libri / DEC, 2023. 344p. 22cm. Bind. ISBN 9788363698966 / 9789538182129. La romano enkondukas la leganton en la vivon kaj socion de la intermilita Jugoslavio. La ĉefrolulino baziĝas sur reala persono, kiu pereis dum la Holokaŭsto. € 36,00

Sadako volas vivi! Karl Bruckner. En Esperanton trad. J. Duda. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023. 173p. 21cm. Bind. ISBN 9788088326403. Kortuŝa romano pri knabino kiu mortis pro la efikoj de la radiado kaŭzita de la atombombado de Hiroŝimo en 1945. € 14,70

Semo de matenruĝoj. Miguel Fernández. Novjorko: Mondial, 2023. 153p. 22cm. ISBN 9781595694539. La poemoj de Fernández estas por laŭtleĝado, recitado, deklamado, skandado. € 18,90

Tokipono – la lingvo de bono. Sonja Lang. El la angla trad. S. v.d. Meulen. s.l.: La tradukinto, 2022. 149p. 23cm. ISBN 9789464376098. "La unua oficiala libro de Tokipono." Kun iom da desegnaĵoj. € 15,00

Vivo de Galilei. Bertolt Brecht. El la germana trad. A. den Haan, W. Jansen. Rotterdam: Lorno, 2023. 147p. 21cm. Ĉefverko de la germana aŭtoro. Simbole oni konsideras ĝin la spirita testamento de Brecht. € 15,00

La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

Bunta kaj abunda

■ Mikaelo Bronŝtejn



Foto de John Huang

Estas io inter kongresaj rutinaĵoj, kio logas atenton ne nur de ĝisostaj lingvoadorantoj, sed ankaŭ de la granda parto de la kongresanoj, venintaj ĉefe por ekskursi en la kongreslando. Tio estas la arta programo, kaj por iĝi vera logaĵo, tiu devas esti bunta kaj abunda. Ĝuste tia ĝi estis en la Torina UK.

Al Torino venis por prezenti sin ne nur preskaŭ ĉiuj ŝatataj personoj de eŭropa Esperanto-arto, sed ankaŭ novaj neordinaraj steloj, salutindaj sur la kongresa podio.

Ĉe vizitado de la artaj programejoj de la kongreso mi ne miris, ke mi



Foto de John Huang

dancetas mem ene de la tuta salono dancetanta kun JoMo. Ke mi ekstaras kun la tuta publiko por gesti kaj kanti kun Kimo aŭ kanoni kun Ankie kaj Nanne. Ke mi subtenas amasajn ridon kaj aplaŭdon dum la kabaredado de Georgo kaj Saŝa. Ke ĝislarne kortuŝita mi estas pro la fascinaj kantoj de Nataŝa kaj Ĵomart. Ke kiel ĉiam la sankta tremo tuŝas min, kiam mi mem venas sur la podion por bardumi kune kun Georgo Handzlik, sed nian dubardan laboron taksu la publiko...

La Birda flut-triopo lasis al mi tre agrablan impreson, same kiel Abel Massiala – ambaŭ neniam antaŭe aŭditaj de mi.



Foto de Jean-François Cousineau

Estis revelacio por mi la konatiĝo kun la arto de Kjara, kiu prezentis sin eĉ dufoje – en la granda scenejo kun tripersona muzikbando kaj en la universitata – recitale kun gitaro en la manoj. Cetere la dua koncerto tuŝis min pli – unue, ĉar mi ŝatas kantadon kun gitarakompano, kaj due, ĉar iom troaktivis en la granda scenejo la brua drumisto de Kjara, forgesante, ke la voĉo de kantistino devas esti la ĉefa instrumento en la ensemblo.

Kuraĝu mi por diri, ke vera ĉerizo sur la pinto de tiu artista kuko estis la lasta Internacia Vespero. La lerta kaj sprita paro de junuloj-anoncistoj invitis

al la scenejo laŭvice reprezentantojn de pli ol dudek landoj diverskontinentaj. Plejmulto el inter ili neniam antaŭe sin montris en UK-oj; nun ili havis ŝancon prezenti ege varian spektron de artaĵoj – jes, bonŝance por ili mem kaj, sendube, por la kongresanoj.

Indas aŭguri, ke ankaŭ la arta programo de la unua UK okazonta en Afriko iĝos bunta, abunda kaj, certe, neordinara, samkiel la kongreso mem.



Foto de Rogener Pavinski

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2023

Estis aljuĝitaj la agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) de la 74-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK). Gvidis la ceremonion en la 108-a Universala Kongreso de Esperanto la sekretario de la BK, Miguel Gutiérrez Adúriz, kun subteno de la eks-estrarano Sara Spanò. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández. Okaze de la 74-a eldono de la BK estis ricevita entute 180 verkaĵoj. La agnoskoj estis:

Branĉo Poezio

Juĝkomisiono: Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu.

Partoprenis 51 verkoj de 29 aŭtoroj el 18 landoj [7 el Afriko, 4 el Azio, 9 el Ameriko, 29 el Eŭropo, 2 el Oceanio]

La unua premio estas aljuĝita al "Danco makabra" de Nicolino Rossi el Italio.

La dua premio estas aljuĝita al "Murditaj floroj" de Evgenij Georgiev el Kazahio.

La tria premio estas aljuĝita al "La kastelo Raseborgo en aŭgusto 1993" de Jouko Lindstedt el Finnlando.

Honora mencio estas aljuĝita al "Kovrilo" de Evgenij Georgiev el Kazahio.

Honora mencio estas aljuĝita al "Difini la morton" de Jouko Lindstedt el Finnlando.

Branĉo Prozo

Juĝkomisiono: Trevor Steele, Julian Modest, Antonio Valén.

Partoprenis 42 verkoj de 26 aŭtoroj el 16 landoj [5 el Afriko, 5 el Azio, 9 el Ameriko, 23 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al "Elemér ripozu pace" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La dua premio estas aljuĝita al "Mia amiko Timoteo" de Tobiasz Kubisiowski el Pollando.

La tria premio estas ne aljuĝita.

Honora mencio estas aljuĝita al "Matĉo iĝis Sinjoro Dobroz" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

Honora mencio estas aljuĝita al "Nupto" de Carlo Minnaja el Italio.

Honora mencio estas aljuĝita al "Artinspiroj" de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Branĉo Mikronovelo

Juĝkomisiono: Tim Westover, Trevor Steele, Miguel Fernández.

Partoprenis 59 verkoj de 28 aŭtoroj el 18 landoj [16 el Azio, 11 el Ameriko, 32 el Eŭropo].

La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al "La nuklea erao" de Christian Rivière el Francio.

La dua premio estas aljuĝita al "La dormanta belulino" de Laure Patas d'Illiers el Francio.

La tria premio estas aljuĝita al "Fredo Malaperis!" de Debra Hamel el Usono.

Honora mencio estas aljuĝita al "Mia korpo" de Anastasia Bausk el Rusio.

Honora mencio estas aljuĝita al "Mi kaj li" de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

Branĉo Teatraĵo

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipović, Georgo Handzlik

Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando [1 el Eŭropo].

La unua premio estas ne aljuĝita.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas aljuĝita al "La Manĝejo de la Kvarfolio" de Raffaele Del Re el Italio.

Subbranĉo Monologo aŭ Skeĉo

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipović, Georgo Handzlik

Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj [1 el Azio, 2 el Eŭropo].

La unua premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas aljuĝita al "Kromnomo" de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Honora mencio estas aljuĝita al "10-20-40-80" de Amir Naor el Israelo.

Infanlibro de la jaro

Juĝkomisiono: Ricardo Albert Reyna, Edmund Grimley Evans, Martin Markarian.

Partoprenis 2 infanlibroj de 2 eldonejoj el 2 landoj [ambaŭ el Eŭropo].

La premio "Infanlibro de la jaro" estas aljuĝita al la Eldonejo "Verda Stelo Esperanto Asocio Nyíregyháza", pro la verko "La malbela knabino" de Veronika Marék, tradukita de János Sárközi.

Branĉo Eseo

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Partoprenis 11 verkoj de 9 aŭtoroj el 8 landoj [7 el Eŭropo, 4 el Ameriko].

La unua premio – premio Luigi Minnaja – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas aljuĝita al “Kunfluo de homaj valoroj en la verka-ro de migranto Trevor Steele” de Carlo Minnaja el Italio.

La tria premio estas ne aljuĝita.

Honora mencio estas aljuĝita al “ChatGPT: Ĝi vomas ĉion, krom genio” de Brandon Sowers el Usono.

Branĉo Kantoteksto

Juĝkomisiono: Ĵak Le Puil, Ankie van der Meer, Flavio Fonseca.

Partoprenis 11 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj [1 el Afriko, 1 el Azio, 9 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita en egaleco al la verkoj: “Nia kato” de Tomas Frejarö el Svedio, kaj al “Bilbokloĝoj” de Serge Sire el Francio.

La dua premio estas aljuĝita al “Nun komenciĝas nova viv” de Tomas Frejarö el Svedio.

La tria premio estas aljuĝita al “Jettio” de Evgenij Georgiev el Kazahio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Ni kantos en teamo” de Antonio Valén el Hispanio.

Filmo kun la kompleta rezulto spekteblas ĉe: <https://youtu.be/CIUamy7Rofw>.

UEA gratulas al ĉiuj agnoskitoj kaj kuraĝigas ĉiujn partopreni en la 75-a eldono de la BK kaj en la aliaj artkonkursoj ligitaj al Esperanto. Ĉiuj ankaŭ estas kuraĝigataj legi la aŭtorojn, ekze en la Belartaj Rikoltoj aŭ en aliaj eldonaĵoj: <https://katalogo.uea.org>.

AMO

AMO ĝis 102, EKO ĝis 48

■ Stefan MacGill

Post la junia jubilea seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en Hungario, sekvis en julio AMO 101 en Latvio (nova lando por la AMO-seminarioj), kaj en aŭgusto AMO 102 kadre de la Kongreso de ILEI en Italio.

Planoj por la cetero de la jaro estas nun prilaborataj: el la Itala-Pola kunlaboro rezultos seminario oktobre kun la temo “Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon”. Kroatio gastigos seminarion novembre kun la temo “Esperanto en la publikaj bibliotekoj”. Restas klopodoj okazigi seminarion en Fortaleza ene de la Tut-Amerika Kongreso, TAKE. Tio okazos inter la 2-a kaj 5-a de novembro. Restas invito al Afriko gastigi seminarion en

la jarfina periodo, kaj diskutoj okazas pri la ebloj en kelkaj landoj.

Jam disiris en 2023 kvardek sep komunikoj de EKO, ĉefe pri la landa kaj faka agado. La Komunikoj 48, 49 kaj 50 estas en preparo. Tiuj komunikoj multe raportas pri la laboroj de ILEI, danke al tre regula ricevo de mesaĝoj de la nuna estraro de la Ligo. Kun lastatempaj komunikoj disiris alkröcite instruhelpaj dokumentoj el la kolekto tenata ĉe la nuna verkinto.

Universala Kongreso

Esperanta teamo venkis per 6-3

En ĉarma internacia kaj amikeca etoso, la futbala matĉo inter geesperantistoj kaj la reprezentantoj de pluraj geenmintoj el Peruo en Torino finiĝis 6-3 por la verduloj. Dum la tuta matĉo la subteno al nia teamo estis kunordigita fare de la akordiono de Kim Henriksen.



Landa agado en la Universala Kongreso

■ Renato Corsetti, surbaze de raportoj de: Aimé Patrick Manirakiza, Guy Matte, Ilia Dewi kaj laŭ sugesto de la estrarano de UEA pri Landa Agado, Aleks Kadar

UEA estas siaj kontinentaj komisionoj kaj la komisionoj estas siaj landaj asocioj

La ĉi-jara Universala [verdire Mondana en la parola Esperanto] Kongreso en Torino estis la unua vera postpandemia ĉeesta kongreso de la lastaj jaroj kun sufiĉa nombro da veraj homoj tuŝeblaj anstataŭ bildoj sur ekrano.

Abundis afrikanoj antaŭvide de la posta kongreso en Aruŝo, Tanzanio, sed ne mankis homoj el aliaj mondopartoj. Vasteta kvanto da ĉinoj kaj koreoj reprezentis Azion kaj eĉ la prezidanto de la aŭstralia asocio saltis al Torino per sia privata kanguroo. Do, estante ĉiuj tie, ili povis rekonstati la malnovan refrenon, ke UEA ne ekzistas en la mondo, aŭ pli precize, ĝi ekzistas per siaj kontinentaj komisionoj. Kie la kontinenta komisiono estas malforta, UEA kaj Esperanto estas malforta. Ekzemple en la islama mondo. Siavice la kontinentaj komisionoj ekzistas kaj agas per siaj landaj asocioj.



Foto de John Huang



Foto de So Jinsu

Se en Etiopio ne ekzistas landa asocio, Esperanto kaj la Afrika Komisiono ne ekzistas tie.

Sed nun ekster la ĝeneraligoj, ni provu vidi kio okazis en Torino dum la kunsidoj de la kontinentaj komisionoj. Mi devos draste mallongigi la ricevitajn raportojn pro spaco-konsideroj. Ni komencu de Afriko:

Dum la UK en Torino okazis prezentado pri Regionaj komisionoj, kaj la Kunordiganto de la **Afrika Komisiono (AK) de UEA** prezentis la agadojn, kiujn la AK jam faris kaj ankaŭ daŭripovajn projektojn. Jen la resumo de la prezentado:

De kiam la komisiono komencis sian laboron, ni jam vidis multajn ŝanĝojn rilate al kunlaboro sine de la Esperanto-movado en Afriko: kelkaj novaj landaj asocioj aŭ sekcioj de TEJO aperis, ekzemple la asocio de junaj senegalaj esperantistoj (SEJ), kaj multaj Esperanto-kursoj okazas interrete en Burundo, Tanzanio, DR Kongo, Zambio, Senegalio, Mozambiko. Estis starigita la retradio, kiu elsendos programojn en Esperanto, kio permesos plialtigi la nombron de la esperantistoj, www.afrikaretradio.com. Estis preparolata ankaŭ la subteno al ekzistantaj

Esperanto-klubo antaŭvide al multigo de partoprenantoj en la venontjara Universala Kongreso en Afriko.

Sekvis la kunveno de la komisiono **MONA [Meza Oriento kaj Norda Afriko]**. Bedaŭrinde pro vizo-malfacilaĵoj la irana kunordiganto de la komisiono ne povis ĉeesti. Ĉiuokaze la kunveno estis ankaŭ rete partoprenebla kaj pro tio la prezidanto de la irana landa asocio povis legi raporton pri ĝia agado, el kiu ni prenas nur la ĉefajn punktojn:

- Regula publikigado de la revuo *Iranaj Esperantistoj* kun artikoloj ankaŭ en kvar lingvoj: Esperanto, la persa, la kurda kaj la araba.
- Retaj seminarioj kunlabore kun universitatoj en diversaj urboj en Irano por prezenti Esperanton al studentoj, profesoroj kaj la ĝenerala publiko. El tio ofte rezultas Esperanto-kursoj por komencantoj.
- Esperanto-kursoj en la Universitato de Mazandarano kaj la Universitato de Tehrano.

Estis montrataj ankaŭ filmeto de kurso en la araba kaj estis preparolata la ekesto de Telegram-grupo de esperantistoj en Egiptio kaj la ebleco aranĝi novan ĉeestan Mezoriantan renkontiĝon en Turkio.

Kunvenis ankaŭ la **Komisiono por agado en Eŭropo de UEA**, en kiu la atento iris ĉefe al la sukceso prezenti proponon en la konferenco pri la estonteco de Eŭropo rilate al Esperanto, kiu estis unu el la plej popularaj proponoj, tamen ne akceptita en la fina decido de la organizanta eŭropa instanco. Krome oni parolis pri la bezono pri informado pri Esperanto al neesperantistoj kaj pri la oportuno aranĝi retajn kursojn kun instruisto en ĉiu eŭropa lando en la landa lingvo. Kelkaj landoj jam faris tion en la pasinta jaro, sed necesas ĝeneraligi tiun agadon. La prezidanto de Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) anoncis la kampanjon, kiun ili intencas fari okaze de la eŭropaj elektoj de membroj de la eŭropa parlamento en 2024.

La kunveno de la **Amerika komisiono** esti multe pli strukturita laŭ punktoj. Dudeko da partoprenantoj konsideris la laborplanon por 2023 de la Komisiono:

- Organizado de Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), okazonta en Fortaleza, Brazilo, 2-5 novembro 2023
- Restarigo de la retpaĝaro *Ameriko.org*
- Instruado de Esperanto per kursoj por hispanlingvanoj kaj portugallingvanoj
- Libro-bienalo en Brazilo
- Identigo de konsilistoj en ĉiu sud-kaj-centra-amerika lando

Poste, la partoprenantoj menciis kelkajn iniciatojn, kiuj estis: komuna Ĉilia-Argentina Esperanto-kongreso en 2024 aŭ 2025; organizado de AMO-seminario dum TAKE; uzado de datum-bazo por kunligi la esperantistojn en la



Foto de John Huang

Amerikoj; uzado de Telegramretoj kiel *Esperanto en Ameriko*

Kaj tre ampleksaj vidaj dokumentoj estis projekciataj dum la kunveno de la **Komisiono Azia-Oceania (KAOEM)**. La kunveno okazis hibride, en Torino kaj per Zoom. Virtuale la prezidanto s-ro Nisinaga Atusi ĉeestis kaj salutis la ĉeestantojn. La sekretario de KAOEM, Ilia Dewi, prezidis kun la helpo de s-ro Namba Fumiharu kaj komencis la kunsidon pere de mallonga prezentaĵo pri KAOEM, kiu nun havas 14 landajn reprezentantojn. Ili estas el Japanio, Koreio, Ĉinio, Mongolio, Barato, Nepalo, Pakistano, Taĝikio, Irano, Israelo, Indonezio, Vjetnamio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Krom membroj, ĉeestis en la kunsido ankaŭ du junaj esperantistoj el Orienta Timoro, kiuj aktivis en la junulara movado en sia lando.

Unue Chen Ji, ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, per filmeto prezentis la lastajn okazaĵojn en la ĉina Esperantujo, inter kiuj la plej grava estas la lasta landa kongreso kun elekto

de la nova estraro. S-ro So Jinsu, kiel estrarano de UEA, ĉeestis kaj parolis pri atingoj de la ĉi-jara UK rilate al KAEOM kaj la graveco de la kunsido. Sekvis la raporto de la komisiono kun pluraj punktoj rilate al la agado en pluraj aziaj kaj oceaniaj landoj. Pro spacomanko en ĉi tiu artikolo mi mencias nur kelkajn el ili:

- La 10-a Azia-Oceania Kongreso, okazinta en Busano, Koreio
- La 40-a Komuna Seminario inter junularoj el Koreio, Japanio, Ĉinio kaj Vjetnamio
- La 1-a Internacia Taŝkenta Esperanto-renkontiĝo TERO en Uzbekujo
- La 5-a Speciala Ekskurso de Nepala Esperanto-Asocio en 2023 kaj la 14-a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2024
- La agado de la Esperanto-klubo en la Universitato Azim Premji (APU) en Bengaluro, Barato
- La ekesto de Esperanto-movado en Orienta Timoro
- La aŭstralia kaj nov-zelanda kongreso kaj somerkursaro en 2023
- La 109-a Japana Esperanto-Kongreso.

La kunsido finiĝis per filmetoj pri la projekto de Teo, Amo kaj la Mondo, kiu estas organizita de Tianjin-a Esperanto-Asocio. Vizitu la retpaĝon de KAOEM ĉe <https://weakaem.wordpress.com/> kaj la fejsbuk-paĝon de KAOEM.

Kiel ni povas konstati, kvankam kun malsamaj aliroj, la kunvenoj montris vastan panoramon de tio, kion UEA faras tra la mondo. Ĉio cetera estas paroladoj. La vera UEA estas en Orienta Timoro, kie kelkaj kuraĝaj gejunuloj provas larĝigi la limojn de Esperantujo.



Foto de So Jinsu

Ekde aprilo 2017 ĉiunumere de la revuo *Esperanto* seninterrompe aperis la rubriko "Afriko brilas". Ekde tiu ĉi numero la torĉon plu portos nova rubriko: "Afriko vokas".

La Redakcio


109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024

Ŝviti aŭ ne ŝviti, jen la demando

Mireille Grosjean

En Kotonuo, Benino, mi staris surstrate kaj subite estis ĉirkaŭita de tre etaj gutoj. Mi diris: Pluvo komenciĝas. Respondo venis: Tute ne. Kaj fakte ne estis komenco de pluvado. Neniam kaj nenie mi estis tiel en ia amaso da gutetoj, kiuj ŝvebis en la aero sen fali suben. Sekve de tio mi obtenis klarigon de mia onklo Primault, 101-jara, kiu vivas en Zuriko, kie li instruis meteorologion en Teknika Altlernejo. Por komenti pri loka klimato, oni devas observi du aspektojn: la temperaturon kaj la humidecon. Tiu paro faras, ke depende de ilia rilato, oni sentas sin bone aŭ oni sentas pezon, malagrablan senton de varme. Se la humideco atingas 99%, daŭre akvo estas en la aero en gasa stato. Se la humideco tiam altiĝas, en iu momento ĝi atingas 100% kaj tiam fariĝas akvo, likva akvo. Gutetoj. Povas esti, ke post kelkaj sekundoj ĝi falas al 99% kaj tiam la gutetoj malaperas.

Post la ILEI-Kongreso en Pusano, Sud-Koreio, ni havis komunan buson por atingi Seulon, kie okazis la UK en 2017. Kompreneble la buso havis klimatizilon. Do ni ĝuis agrablan temperaturon en la buso, kiam ekstere estis



tre varme kaj tre humide, kiel kutimas esti en junio ĝis septembro en tiu orienta parto de Azio, kiu konas musonojn. Subite mi vidis, ke la ŝoforo ekfunkciigis la viŝilojn sur sia antaŭa glaco. Mi deduktis, ke pluvas. Mi rigardis eksteren: neniu uzis pluvombrelon. Do ne pluvis. Kio okazis: La humideco estis tre alta, eble je 99%, kaj tiu humida aero venis en kolizio kun nia buso, kiu estis malvarma pro la klimatizilo. Do la akvo en gasa stato ekstere kondensiĝis sur la malvarma antaŭa vitro kaj formis gutetojn.

Mia onklo klarigis al mi ankaŭ, kial la humideco post pluvego en Benino falas de 60% al 40%... Mi supozis la malon. Sed ni restu ĉe klimato.

Klimaton oni povas difini per kvar donitaĵoj:

Latitudo

Nia kongresurbo Aruŝa kuŝas je 3 gradoj sude de la Ekvatoro.

Altitudo

Nia kongresurbo kuŝas je 1400 metroj super la marnivelo, do en montaro.

Situo en kontinento

Aruŝa situas for de la maro.

Marfluoj

Ili ne ludas rolon en nia esploro.

Pri situo en kontinento: (el Vikipedio) «Ju pli oni eniras kontinenton, des malpli graviĝas la balanca influo de la maro, kiu surbaze de granda specifa varmokapacito de la akvo prezentas grandan varmorezervecon. Samtempe malpliĝas la nombro de nuboj kaj humidoenhavo de la atmosfero».

Mi plurfoje restadis en Benino. En Burundo mi restadis dufoje. Mi restadis en Afriko proksimume jaron kaj du-

onon. Mi neniam estis en Tanzanio. Pro tio unu el niaj tanzaniaj samideanoj aŭ burundanoj provlegas miajn tekstojn kaj komentas ilin kaze de bezono. Mia celo estas transdoni al eŭropanoj **faktojn** kaj **observojn** pri Afriko por kuraĝigi ilin iri al la UK 2024.

La ĉefurbo de Burundo ĝis 2018, Buĵumburo, kiun mi bone konas, situas je la sama latitudo kiel Aruŝa. La altitudo iom malsamas: Buĵumburo kuŝas je 800 metroj kaj Aruŝa je 1400 metroj. Do la klimato en Aruŝa devas esti ankoraŭ pli agrabla ol tiu de Burundo. La du ceteraj kriterioj samas.

La diferencoj inter Kotonuo, la ekonomia ĉefurbo de Benino, kaj Aruŝa estas pli grandaj. La latitudo de Kotonuo estas 6 gradoj norde de la Ekvatoro. Do malgranda diferenco. Altitudo de Kotonuo (haveno!): 0 metroj. Situo en kontinento: tute borde, do mara influo. Marfluojn ni povas forgesi.

En Kotonuo mi povis bone vivi kaj labori en pluraj restadoj dum sume pli ol jaro. Pri tiu paro temperaturo-humideco, mi konstatis, ke la plej agrablaj vestaĵoj estas vastaj, teksitaj (ne trikitaj kiel ĵerzo) kaj el naturaj fadenoj kiel koton, silko aŭ lino. Vestaĵoj el

artefaritaj fadenoj ŝvitigas la personon multe pli. Do bluzoj, ĉemizoj, roboj, jen la ŝlosilo de komforto. Leĝeraj pantaloj vastaj bonvenas. Nepras paki sunprotektan kremon por la haŭto, ĉapoj kaj sunokulvitrojn. Enmana ventumilo povas helpi. Do jen sugestoj por la partoprenantoj de nia 109-a UK en Tanzanio.

Ni memoru, ke UEA elektis por UK la urbojn Tokio (1965), Seulo (1994), Pekino (2004), Jokohamo (2007), Hanojo (2012) kaj Seulo (2017). Abundis la kongresanoj en julio en tiuj varmaj kaj humidaj urboj. Tutcerte la montara klimato de Aruŝo estos pli agrabla.

Landa agado

Esperanto-informbudo ĉe la Zamenhof-monumento en la Esperanto-urbo Herzberg

■ Petro Zilvar,
Zsófia Kóródy

Antaŭ kelkaj monatoj la tutlanda organizaĵo DEIN (DEMokratio & INformado) el Munkeno alvokis al agado kontraŭ malamo kaj kontraŭ kontraŭsemitismo por la mondlingvo Esperanto kiel komuna neŭtrala pontlingvo je favoro al interpopola kompreniĝo.

Okaze de la tutlanda informadkampanjo ili eĉ montris la Zamenhof-monumenton en Herzberg.

La asocio DEIN alvokis asociojn, privatulojn ktp. organizi la 10-an de julio en Germanio agadojn kontraŭ malamo kaj por interpopola kompreniĝo.

La kialo estis kaj estas, ke la 10-an de julio 1945 je la unua fojo post la Dua Mondmilito oni publike prezentis en Dreseno la faman dramon *Natan la Saĝulo*. La fama aŭtoro estis Gotthold Ephraim Lessing el Wolfenbüttel.

La teatraĵo okupiĝas pri la demando, kiu el la grandaj mondreligioj estus la plej bona. La elementaj temoj rilatis al humaneco, moralo kaj toleremo.

Je tiu memorinda tago oni volas (ankaŭ dum la venontaj jaroj) organizi publikajn informagadojn.


La Esperanto-Centro de la Esperanto-urbo organizis la 10-an de julio



informbudon sur la Zamenhof-placo apud la Zamenhof-monumento. Krom ĝeneralaj informoj pri la lingvo kaj senco kaj celo de Esperanto, ni informis pri la fama ideo de la Esperanto-iniciatoro d-ro L.L. Zamenhof.

Kompreneble ni povis montri al la informpetintoj la Esperanto-version de la teatraĵo *Natan la Saĝulo* de G.E. Lessing.

Ĉe la Esperanto-informbudo



Abunda Hibrida Sciencia programo en Torino

■ Amri Wandel

Dum la unuaj tri tagoj de la UK realiĝis pli ol duono de la abunda sesio de la Internacia Kongresa Universitato. El 9 IKU-prelegoj kaj 10 prelegoj de la Sciencia Kafejo (SK) okazis 6 IKU- kaj 5 SK-prelegoj. Ĉiuj prelegoj okazis hibrinde kaj estis registritaj. Laŭplane ili estos spektblaj en la Virtuala Kongreso en novembro kaj en la jutuba kanalo de UEA, UEA-Viva. La plimulto de la prelegoj estis ankaŭ anoncitaj en Eventa Servo kaj diskonigitaj en la UEA-retlistoj, tiel ke ankaŭ ne-kongresanoj povis ilin spekti defore.

En la IKU-inaŭguro, kiu sekvis la kongresan malfermon, la IKU-rektoro Fabrizio Pennacchietti invitis la prelegantojn fari unu-minutajn reklamojn de siaj prelegoj. Konciza historia skizo de IKU kaj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) estis prezentitaj de la prezidanto de AIS kaj IKU/SK-organizanto Amri Wandel.

Sekvis la unuaj du IKU-AIS prelegoj, pri Kvantuma Interplekteco: La mistera kvantuma gluo (Jacobsen) kaj la Kikonga lingvaro (Goes). Lunde okazis la du sekvaj IKU-prelegoj: IKU-AIS3 pri Lingva pejzaĝo (Labrie) kaj IKU4 pri Ekstertera vivo (Wandel).

Marde matene okazis la unua sesio de la Sciencia Kafejo kun kvin prelegoj de po duonhoro, pri tre variaj temoj: Robotoj (Baláž), Gemoj (Raola), Neŭropedagogio (Tarracchini), Ramstedt (Lindstedt) kaj la Arkivoj de UEA en Vieno (Tuider). En la IKU- kaj SK-prelegoj ĉeestis surloke 50-100 aŭskultantoj kaj per Zoom sekvis inter 5 kaj 20. Post la prelegoj okazis viglaj demando-sesioj, foje eĉ venis demandoj per Zoom.

Sekvis IKU5 pri Boulton (Tonkin) kaj 6 pri Academia Interlingua en Torino (Barandovská-Frank). Drama momento okazis en la prelego de prof. Vera Barandovská-Frank: mallonge antaŭ sia prelego ŝi rompita la manon kaj tamen insistis liveri la prelegon malgraŭ fortaj doloroj. Tuj post la prelego ŝi estis urĝe portita al la hospitalo, kie ŝi ricevis gipsan memoraĵon el Torino.

Fakaj Asocioj prezentis sin en la Faka Forumo kaj dum la Movada Foiro

Marde posttagmeze okazis la Faka Forumo, dum kiu prezentis sin 15 Fakaj Asocioj: IFEF, SAT, ELF/AREK, INA (naturkuracistoj), ATEO, IKUE, Oomoto, TAKE, UIAE (advokatoj), BEL, Naturistoj, Ŭonbulistoj, Eŭropo-Demokratio-Esperanto, LSG. Oni povis sekvi per Zoom, sed pro teknika problemo ne eblis defore prezenti, kio tamen malhelpis nur al unu Faka Asocio (TEĴA).

Pliaj Fakaj Asocioj, kiel ankaŭ aliaj grupoj kaj organizaĵoj povis prezenti sin dum la bunta Movada Foiro, kiu okazis kiel kutime en la unua vespero de la kongreso, sabate. Jam estas delonge sciata ke la Movada Foiro estas



tre populara aranĝo, sed nun tiu scio ricevis oficialan konfirmon: en la enketilo inter UEA-membroj, respondita de pli ol 600 personoj (vidu p. 187) ĝi estis elektita kiel la plej populara programero de la UK. Menciindas tiurilate ke la trian lokon de la plej populara programero atingis la Internacia Kongresa Universitato.

Maratona sciencia programo kaj AIS-ekzamenoj

Ĵaŭde okazis rekorda nombro de naŭ prelegoj samtage. Kvin de la Sciencia Kafejo: La Memoro (Butan), Mondreĝeco (Dawson), La unuaj E-vortaroj (Eckert), La danĝera lumo (Fontaine), Kalkuliloj (Lo Jacomo). Sekvis kvar IKU-prelegoj pri variaj temoj: Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo (Grant Goodall) kaj la daŭrigaj IKU-AIS prelegoj pri Kvantuma interplektiteco de Jesper Jacobsen, La kikonga lingvaro



de Heidi Goes kaj Lingva Pejzaĝo de Gabriel Labrie. Post la prelegoj de Jacobsen kaj Labrie okazis AIS-ekzamenoj, kiujn partoprenis sukcese 10 kaj 7 el la aŭskultantoj, respektive. Ili ricevis siajn AIS-atestilojn publike dum la Sciencia Forumo, vendrede.

Sciencia Forumo, Premio Pirlot kaj ISAE

Vendrede okazis la lastaj du IKU-prelegoj, IKU8 pri Hidrogena Ekonomio (So) kaj IKU9 pri La DNA de Esperanto (Pennacchietti), ambaŭ antaŭ plenplena salono kaj kun multaj demandoj fine de la prelegoj.

Posttagmeze okazis la Scienca Forumo kun resumo de la tuta IKU-sesio, kaj disdono de la AIS-atestiloj al la ekzamenitoj en la IKU-AIS-kursoj. La ekzamenitoj kiuj ne ĉeestis, povis preni sian ateston sabate post la fermo aŭ daŭre povas peti elektronikan ateston de amriwandel@gmail.com.

Dum la Scienca Forumo oni ankaŭ anoncis la rezultojn de la Premio Pirlot por la plej bona scienca libro de la jaro. Estis kvar kandidatoj. La unuan lokon la ĵurio (Renato Corsetti kaj Carlo Minnaja) aljuĝis por *La Kosmo kaj Ni* (4-a eld., 2022 de D. Galadi kaj A. Wandel). La dua premio estis aljuĝita por *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado* trad. M. Maitzen kaj R. Fössmeyer. La tria loko ne estis aljuĝita.

Okazis en la Scienca Forumo ankaŭ diskuto pri la estonteco de la scienca agado en Esperantujo, aparte pri Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), kiu daŭris dum tuj sekva prelego pri ISAE, kiun gvidis Francesco Maurelli.

La IKU-libro furoris en la Libroŝervo, ĉe la urbestro kaj en la Aŭkcio

Dum la urbestra akcepto la Prezidanto de UEA donacis al la vicurbestro de Torino kelkajn librojn, inter ili la IKU-libro, pri kiu li klarigis la sciencan valoron kaj prezentis la itallingvajn resumojn. La IKU-libro estis aĉetebla en la Libroŝervo kaj ĉe la IKU-prelegoj. La cent presitaj ekzempleroj de la IKU-libro preskaŭ elĉerpiĝis jam unu tagon antaŭ la fino de la kongreso. Kun 241 paĝoj, 19 altnivelaj tekstoj de ĉiuj prelegoj, 3-lingvaj resumoj kaj multaj ilustraĵoj ĝi estas la kulmino de scienca Esperanto-eldonado. La tradicia ekzemplero de la IKU-libro kun la subskriboj de la aŭtoroj estis prezentita en la Aŭkcio de Amri Wandel kaj atingis sufiĉe altan prezon. Kiel en la antaŭaj jaroj, la IKU-libro estos ankaŭ senpage elŝutebla rete, pri kio oni anoncos aparte.

Universala Kongreso

Bunta kaj altkvalita 45-a Esperantologia Konferenco

■ Javier Alcalde

Du trihoraj sesioj konsistigis la ĉi-jaran Esperantologian Konferencon en Torino, kunordigitan de Mark Fettes (virtuale) kaj Javier Alcalde (ĉeeste). Inaŭguris la unuan sesion Jouko Lindstedt per polemika (tamen konvinka) argumento: Esperantologio devus sendependiĝi de Interlingvistiko; dum la postaj demandoj, pluraj ĉeestantoj konsentis prie. Daŭrige, Klaus Schubert komparis skribajn tekstojn el la fruaj jardekoj de Esperanto kun la nuna lingvo-uzo kaj deduktis interesajn liniojn de evoluo pri vortprovizo, gramatiko kaj stilo, simile al tio kio okazas en iu ajn 'normala' lingvo. Temis pri du konataj fakuloj, kiuj elstare plenumis la altajn esperojn de la publiko. Trie, venis la vico de juna esploristo Eric Macpherson, kiu en reta prelego el Vieno alvokis al faka kaj metoda plurfakeco en la homaj kaj sociaj sciencoj pere de ekzemploj rilate al Esperanto. Siaflanke, la poeto kaj akademiano Nicola Ruggiero prezentis ambician projekton kompili Homeran leksikonon surbaze de la unua kanto de Iliado kaj de oftelistoj de vortoj en tiu epopeo. Lia celo estas krei vortaron de la helena (t.e. la antikva greka lingvo), kiu subtenos la kreon de fidindaj tradukoj en Esperanto. Fine, surbaze de propraj spertoj

en Poznano (sed ne nur), Ilona Koutny enkondukis virtuale necesan debaton pri manieroj plifortigi la instruadon kaj esploradon pri Esperanto en universitataj medioj.

James Rezende Piton komencis la duan sesion per atentokapta montrado de filatelaj dokumentoj kiuj trairis oficialan poŝtan cenzuron dum mondaj kaj lokaj konfliktoj tra la 20-a jarcento. Jen pionira esploro kiu enkadrigas Esperanton en pli vasta esploro pri lingvoj sub poŝta cenzuro. Sekve, okazis kuraĝa unua esperantlingva prelego aparte laŭdata de pluraj aziaj ĉeestantoj. Joseph Essertier, fakulo pri la japana esperantisto Saito Hidekatsu, analizis la rilaton al Esperanto de tiuj kiuj klopodis latinigi la ĉinan lingvon. Poste venis reta prelego el Badalono, Katalunio, en kiu Rubèn Fernández dividis la provizorajn rezultojn de sia magistra esplorado pri la ŝancoj kaj defioj de Esperantaj heredaĵoj en (lokaj kaj naciaj) publikaj arĥivoj; sekvis vigla diskuto prie. Siavice, Pascal Dubourg-Glatigny klarigis la imponan survojan projekton (kaj ties defioj) ciferecigi ampleksan arĥivon (entute pli ol 8000 dokumenteroj) kiu detalias la vojaĝon de la esperantisto-laboristo-biciklisto Lucien Péraire (1928–1932) Azien, kaj ilustris ĝin per aro da vojaĝlibretoj, bildoj, leteroj, teksaĵoj, eltondaĵoj de periodaĵoj kaj vizitkartoj de tiu arĥivo.



Fine, Vicente Manzano-Arrondo sukcese iniciatis debaton pri strategioj allogi profesorojn lerni Esperanton helpe de konkreta sperto en la Universitato de Sevilo. Ĝi baziĝas sur demandaro realigita de la softvaro NiFARU, siavice farita per lingvo de programado, NiFO, kies komandoj estas Esperantaj.

Atendeble, pluraj el tiuj prelegoj aperos artikolforme en la faka revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*, kiun en Torino prezentis ĝia redaktoro Klaus Schubert. Informojn pri tiaj temoj daŭre eblas ricevi danke al *Informilo por Interlingvistoj* (IpI); nome de la redakta skipo prezentis ĝin surloke Bengt-Arne Wickström. (Detaloj kaj arĥivoj de ambaŭ periodaĵoj troviĝas en la retejo de CED, interlingvistiko.net). Resume, dek prelegoj kaj tri mallongaj prezentoj en aparte bunta kaj altkvalita Esperantologia Konferenco.

EKRA – 2023

■ Daniela Deneva Power

De la 16-a ĝis la 18-a de junio, la Esperantista domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev” en Razgrad, Bulgario, okazigis la 34-an Esperantistan Krean Renkontiĝon “Abritus” (EKRA). Estas mirinde, ke en la relative negranda urbo la movado estas tiel vigla kun fortaj intelektulaj tradicioj. Venontjare oni celebros la centjarigon de la organizita esperantista movado, sed unu el la pioniroj jam partoprenis la Unuan kongreson en Boulogne-sur-Mer. Ekde 1922 oni instruis Esperanton en la gimnazio. Dum la postmilita epoko la movado floris. En 1984 estis fondita Centro de esperantista kulturo, la nuna EDK, por popularigi la Esperantan kulturon en la lando kaj, pere de Esperanto, la bulgaran tra la mondo. Ekde 1990 la domo ĉiujare okazigas EKRA, festajn tagojn de literaturo, muziko kaj arto, kies kulmino estas anonco de la rezultoj de la anonimaj Internacia konkurso pri originala Esperanta poezio kaj humuro kaj Nacia konkurso pri traduko el la bulgara al Esperanto.

EKRA-2023 okazis en la salono de la regiona artgalerio. S-ino Ivaniĉka Maĝarova, fama verkistino en Esperanto kaj la bulgara, iama prezidantino de la kultura domo, kaj la aktoro Plamen Penĉev direktis la inaŭguron. Partoprenis gesamideanoj el Bulgario, Rumanio, Serbio kaj Usono. Je la nomo de la Estraro de BEA salutis Veselka Kamburova. La vespero estis celebrego de la literatura verkaro de Georgi Mihalkov (Julian Modest) – elstara bulgara esperantisto, verkisto, tradukisto kaj instruisto, membro de la Akademio de Esperanto, okaze de lia 70-jara datreveno. Sur la ekrano estis projekciitaj fotoj de liaj libroj, kiujn prezentis Ivaniĉka Maĝarova: *Ni vivos*, dramo, dediĉita al Lidia Zamenhof, surscenigita dum la UK en Budapeŝto en 1983; *Transfiguriĝo de Dio*, persone inspirita de la patropreno de lia avo en la Transfiguriĝa ribelo kontraŭ la Otomana imperio; la lasta *La aventuroj de*

Jombor kaj Miki, kreita por lia nepo, kaj multaj aliaj. Samideaninoj legis *Vendisto de steloj el Ripozo en la Karibaj insuloj*, *Nebezonata lingvo*, rakonto el *La vivo en la pasinteco*, Esperante kaj bulgarlingve. Kanjo Kanev dividis kun ni siajn rememorojn pri renkontiĝoj kun la jubileulo. Mi mem havas la feliĉon konatiĝi kun li dum nia unua jaro en la Sofia universitato – tiam li estis prezidanto de la studenta societo. Estis tre agrable aŭskulti junajn pianistojn dum la muzikaj paŭzoj. La vespero finiĝis en la restoracio “Kapitan Blut”, kie ni manĝis, babilis kaj dancis ĝis tre malfrue.

La postan matenon ni renkontiĝis por kafumado en la Esperantista domo. Kelkaj el ni, kiuj estis en la urbo por unua fojo, kun nia bonega ĉiĉerono Plamen Penĉev vizitis la Arkeologian rezervejon Abritus. La grava romia fortikaĵo estis konstruita dum la unua jarcento por gardi la nord-orientan limon de la imperio. En la somero de 251 ĉi tie okazis epopea batalo kontraŭ la gotoj, en kiu pereis la imperiestro Decius. La ruinoj ampleksas 4000 deka-rojn. La muzeo montras multajn artefaktojn de la romia kaj mezepoka tempoj.

La programo de la dua vespero okazis en la arbora restoracio “Les”. En la halo Kalinka Raĉeva regalis nin per kantoj – bulgaraj popolaj kaj Esperantaj. Du junuloj deklamis Esperantajn versojn. S-ino Ivaniĉka Maĝarova – prezidanto de la ĵurio kun la membroj Eva Bojaĝieva (fama bulgara esperantistino, poetino kaj instruistino) kaj Vasil Kadifeli (eminenta turka esperantisto, kiu ĝis 2022 redaktis kaj eldonis la revuon *Turka stelo*) anoncis la rezultojn de la Internacia konkurso pri originala Esperanta poezio kaj humuro. Al Nicolino Rossi el Italio estis aljuĝita Honora premio pro lia multjara altkvalita partopreno en EKRA okaze de lia 85-jara jubileo. La unuan premion ricevis Ewa Grochowska el Francio; la duajn – Nikolaj Neĉaev el Rusio kaj Tatjana Aŭderskaja el Ukrainio; la triajn – Lenke Szasz el Rumanio, Leonid Turkadze el Usono kaj Elena Popova el Bulgario. En la kategorio de humuro la gajnintoj estas: Tatjana Aŭderskaja el Ukrainio – la unua premio; Tatjana Tereĥova el Rusio – la dua; Jorge Rafael Noguerras



el Usono – la tria; Ewa Grochowska el Francio kaj Cyril Vergnaud el Tajvano – instigaj premioj. Dimitrinka Kateva legis “Amo laŭ sezonoj” de Ewa Grochowska. La Nacian konkurson por traduko de la rakonto “Enigmo” de nia jubileulo Georgi Mihalkov partoprenis 7 bulgaroj. La ĵurio konsistis el Georgi Mihalkov, prezidanto, kun la membroj Lilia Nikolova kaj Dimitrinka Kateva. La unua premio estis aljuĝita al Daniela Power el Stara Zagora kaj Hasan Jakub el Omurtag; la dua – al Dimitrinka Mihajlova el Razgrad; la tria – al Katja Draganova el Ruse. La aliaj kvar ricevis instigajn premiojn. Daniela Power kaj Dimitrinka Mihajlova legis en Esperanto fragmentojn el siaj tradukoj kaj Cvetanka Marinova – la tutan rakonton bulgare. La rumana esperantisto Marian Voĉin prezentis sian ampleksan libron pri la historio de la Esperanto-movado en sia lando de 1887 ĝis 2000. Sekvis deklamado de versoj de Zamenhof fare de junuloj. La programon finis la loka koruso “Sopiro”. La adiaŭa vespermanĝo okazis en la restoracio “Les”.

Matene, la 18-an, dekopo el la partoprenantoj tamen daŭrigis esti kune. Per aŭtobuseto ni veturis al la proksima urbo Targoviŝte. Tie ni vizitis la Historian muzeon, kiu troviĝas en la malnova renesanca lernejo, kaj havas kelkajn tre interesajn ekspoziciojn. Poste ni grimpis sur monteton al Misionis, malfrua bizanca kaj mezepoka fortikaĵo, kiu gardis la vojon trans la Balkanan montaron.

Ĝis la revido, Razgrad! Dankon pro la gastamo de viaj loĝantoj, niaj samideanoj, kiuj daŭre metas vin sur la kulturalan mapon de Esperantujo! Certe ni revenos!

Ne en unu tago elkreskis Kartago: pri la Esperanto-tago

■ Renato Corsetti

La proverbaro de Zamenhof formas, ke “Ne en unu tago elkreskis Kartago”. Zamenhof estis profunde trem-pita en la latina kaj greka kulturoj, kiuj tiam superakvis Eŭropon, kaj por li estis klare, kio estas Kartago: tio estas granda kaj signifa urbo, defiinta Romon. Esence li volis diri, ke por fari ion gravan kaj por fari ion grava oni bezonas tempon. Azianoj povus diri: “Ne en unu momento elkreskis Taŝkento”.

Ĉiokaze mi volis diri, ke por igi la feston de la 26-a de julio festata de esperantistoj kaj agnoskata de Unesko oni bezonas tempon.

Sed ĉi-jare oni faris la unuan paŝon de longa vojaĝo.

Labor-grupeto, François Lo Jacomo, Humphrey Tonkin kaj mi mem, komencis turmenti individuajn esperantistojn kaj landajn asociojn pri la Tago de Esperanto, la nacia festo de esperantistoj, la tago en kiu ĉio komenciĝis, la 26-a de julio 1887. La agado havis kelkajn celojn, sed baze ni volas agnoskigi la daton fare de la esperan-

tistoj mem antaŭ ol proponi al Unesko akcepti ĝin kiel Internacian Tagon de Esperanto.

Kaj fakte ĉi-jare la unuan fojon esperantistoj komencis reagi, kaj se vi skribas “Esperanto-tago” en esplor-programo de via komputilo kaj poste petas bildojn, vi konstatos, ke la bondeziroj “Feliĉan Esperanto-tagon!” komencas multiĝi kaj en kelkaj lokoj, ekzemple en Svedio, oni aranĝis festan ekskurson kaj komunan tagmanĝon. Eĉ la deziro, ke oni utiligu la tagon por paroli pri Esperanto al neesperantistoj estis plenumita de kelkaj esperantistoj [mi danku ekzemple la radiajn intervjuojn de la hispanoj kaj la gazetarajn komunikojn de aliaj].

La landaj asocioj estis petitaj komenci rilati kun siaj Unesko-komisionoj por krei etoson de informiteco pri Esperanto, kiu utilis, kiam venos de unu lando propono al la Ĝenerala Asembleo de Unesko pri la deklaro rilate al la Internacia Tago de Esperanto. Vi ne kredos, sed kelkaj komencis fari tion, eĉ se antaŭ kelkaj jaroj al simila peto venis respondoj de la speco

“Ĉu vi certas, ke en nia lando ekzistas Unesko-komisiono?”

Mi konscias, ke mi ne donis kompletan liston de tio, kio okazis, ĉar mi mem ne kolektis ĝin sisteme, sed mi nur volis atentigi vin, ke la afero komencas funkcii. Do, pretiĝu por la venonta jaro.



Enketilo pri UEA

■ Duncan Charters

Ni ricevis pli ol 600 respondojn de UEA-membroj al nia enketilo pri la servoj de UEA, do treege dankas al ĉiuj kiuj prenis la tempon por ĝin plenumi (vi bezonis averaĝe 17 minutojn por plenumi la taskon). Se vi ankoraŭ ne tion faris, kaj povas dediĉi minimume 5-10 minutojn al la unuaj 15 rapidrespondaj elekto-demandoj se ne eblas pli, tio multe helpas al ni havi respondaron sufiĉe reprezentan de la perspektivo de niaj membroj. Membroj bonvolu uzi la jenan ligilon: www.surveymonkey.com/r/uea_membroj.

Se vi povos respondi la demandaron interne de du semajnoj, ni povos inkluzivigi ankaŭ vian respondon en la raporto aperonta en la oktobra numero de la revuo. La enketo restos malfermita ĝis almenaŭ la fino de septembro por ke ĉiuj havu la okazon ĝin aliri.





Kiam Zamenhof revis helpi migrantojn

■ Ro. Sartoro

Kio okazas nun en la mondo, ni ĉiuj perfekte scias...

Kaŭze de la militoj, la koloniisma ekspluatado, la klimataj ŝanĝoj... ktp. oni prognozadas kreskon de malorda migrado en la tuta mondo, kiel jam okazas ekde kelkjaraj en la limoj de Eŭropo kaj aliaj landoj.

Tiu ĉi fenomeno ne estas io nova. La homo estas nature migranto, kaj migras estas "homa rajto". *"La tero estas unu lando kaj ĝia loĝantaro estas egalrajtaj civitanoj"*, eĉ se tio ne plaĉas al aro kiu konsideras sin regantoj de la planedo.

La homo, fiere titolita "sapiens", post miloj da jaroj konkeris la tutan planedon kaj evoluis kune kun la vivantuloj... nun minacas eĉ detrui la Teron... Do vana estos la strebo haltigi aŭ opozicii ĉefe al la "rifuĝintaro", invadanta ĉiujn limojn, serĉante survivon.

Plie ankoraŭ: la teknologio jam faris la planedon unu lando momente komunikanta. La nunaj naciaj limoj estas grandparte tute fuŝaj aŭ absurdaĵaj rezultoj de militoj aŭ imperiismoj.

Do estis la teknologio sen ia helpo de Esperanto, *"kiu detruadas la muregojn..."* (*"kiuj falos por ĉiam... por ke amo kaj vero ekregu sur Tero"*)... en ebla estonta evoluo.

Kompreneble la afero de klimataj ŝanĝoj aŭ iu sovaĝa migrado ne havas rapidan solvon, ĉefe ĉar ĉie lastaj ondoj de enmigrintoj estas vera "rifuĝintaro", forkuranta de militoj aŭ de ne plu tolereblaj vivkondiĉoj.

La problemo ĉefe en Eŭropo povus esti la "integriĝo" de tia ĉi lavan-

go, tre malfacile rapida, unue pro la manko de komuna lingvo kaj ekonomiaj malfacilaĵoj.

1. Indas ke ni pensu pri nia Zamenhof. Nia Iniciatinto profunde komprenis ene de si mem kion signifas esti "migranto", li mem migris el Bjalistoko al Varsovio, poste al Moskvo, al Aŭstrio... krome ke la Biblio montris al li ke la granda sufero de la Juda Popolo estas afero de migrado en la "Diasporo"... De Abrahamo, al Egiptio, al Babilono, al la Greka kaj Romia Imperioj... Finfine al la tuta mondo.

Unu el la preceptoj, ĉiutage memorigenda estis: *"Ne mistraktu migranton, ĉar migrantoj vi estis en lando de Egipto"* (Deut. 10,19).

Li mem deklaris ke lia "integriĝo" estas perfekta, pli ol pollandano li sentas sin esti rusiano...

Do en lia menso aperis kune al la "komuna" lingvo kaj la baza "hilelismo", la ideo proponi unue por la juda persekutita popolo en la Rusia Imperio la kreon de novaj komunumoj en la "nova mondo"... almenaŭ por solvi momente la problemon de persekuto kaj "pogromoj"...

2. En la ruslingva broŝuro *Gillelism* (Hilelismo), eldonita de L. L. Zamenhof en la jaro 1901 sub la pseŭdonimo "Gomo sum" ("Homo sum"), sed verkita post la "Unua Sionista Kongreso" de 1897, la Iniciatinto de Esperanto revis trovi solvon por la "pogroma" daŭra persekutado de judoj (ĉefe en Ukrainio) danke al organizota komunuma emigrado (kun Esperanto kaj "Hilelisma" baza doktrino) al Argentino, Usono kaj Kanado (paĝo 66), landoj konataj de li kun libera eniro de migrantaro.

Post la unua Sionista Kongreso Basilea kun kiu li ne akordis, li volis esprimi proprajn vidpunktojn pri kelkaj aferoj. Uzis kaŝnomon dum estis tempo jam de granda migrado de judoj al Argentino, ĉefe ekde 1890 danke al agado de Barono Hirsch kaj lia "Jewish Colonization Association", kiu tion financis kaj interkonsentis kun la argentina registaro laŭ novaj leĝoj pri emigrado (same en Usono kaj Kanado).

Sendube Zamenhof estis bone informita pri la afero... Eĉ se li kredeble, en sia menso kaj animo komencis kompreni, ke la problemo de la juda popolo superas lin... Do disvastigi la komunan lingvon Esperanto en la tuta mondo (eĉ sen "homaranismo") jam estos komenco de helpo al la monda paco.

Estas konata la historio de Argentino, ke ĝi kiel Usono aŭ Kanado ktp. liberigis aŭ "neŭtralis" la aborigenajn popolojn de la lando, kiun lasis la konata "hispana malkovro kaj konkerito". Do la loka loĝantaro malpliigis kaj la novaj "nacioj" (sen aborigena registaro) kun granda kvanto da grundo malplena kaj vaka... volis eniri "civilizacian" ĉefe danke al "sapiens" de eŭropa migrantaro!

Pri la milionoj da enmigrintoj en la tuta Ameriko oni jam sufiĉe trovas en dokumentaro, eĉ se la plejparto estis vera "rifuĝantaro", ne nur el Eŭropo, sed el Mezoriento k.a., ĉar la unua, dua kaj aliaj militoj okazis kaj daŭras ĝis nun... Do, rifuĝintoj daŭrigas serĉi novajn landojn por survivi.

La rezulto de tia emigrado videblas nun en la tuta Ameriko – "Nova Mondo", kiu jam estis ricevinta la "nigra-afrikanan sklavaron". La "novaj" popoloj, kiuj naskiĝis, estas nekrediblaj "miksaĵoj" de landoj kaj kulturoj. Sekve de inteligenta kulturo de integriĝo. Tamen tio ne estas io nova por la "Patrino Tero", kiu subtenas vivantulojn ekde milionoj da jaroj. Verŝajne

kun la emo perfektigi aŭ evoluigi la specion “homo sapiens”.

3. Oni povas aserti ke Zamenhof iom sukcesis: en la nova mondo Esperanto eniris en la novajn komunumojn. Eĉ se la hillelisma broŝuro ne estis bonŝance konata, la rapida evoluo kaj disvastigo de la “internacia” lingvo je ĝia homarana “interna ideo” eble iom helpis al juda emigrantaro, ĉar multaj “Rabenoj” akompanis la migrantojn por pli bona organizado per sinagogoj kaj lernejoj, ktp. Sed ene de la politiko de integriĝo kaj egaleco antaŭ la leĝoj.

La rezulto por la judoj en Argentino estis la unua generacio de “Judaj gaŭĉoj” agrikulturistoj... poste multaj reenmigrantaj al Israelaj kibucoj... Ĉar

Argentino estis inter la unuaj kiuj agnoskis Israelon kiel novan Ŝtaton.

Kaj Esperanto estis jam instruata en Bonaero ekde la jaro 1889, kun la mencio de esperantistoj en la listoj publikigitaj de Zamenhof mem kaj la unua “Argentina E-Asocio” de 1906, kies prezidantecon li akceptis.

Eĉ se ĉiuj povus aserti ke ankoraŭ Esperanto kaj ĝia “interna ideo” ne multon helpis al paca monda kunvivado... ni estas sur la vojo de la Zamenhofa revo: “*Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos, ĝis la bela sonĝo... efektiviĝos!*”.

La Esperanto-Movado povus danki al novaj teknologioj. Post 136 jaroj Esperanto jam estas “internacia lin-

gvo”, kiu rete aperas apude al la ĉefaj lingvoj de la planedo kun la kapablo traduki kaj verki, ktp... Kian alian “finan venkon” ni devus atendi?

La nuna 108-a UK en Torino, kies ĉeftemo estas *Enmigrado kaj kunfluo de homaj valoroj*, estas tre aktuala... kaj povus doni al nia nova esperantista generacio novan ŝancon de pli aktiva kaj organizita agado por paca interkompreniĝo kaj monda kunvivado...

Sen la deĵoro de kutimaj imperiismoj “ŝakale” submetantaj popolojn, “la granda homaro” povus praktiki la “kredon de’ 1 Koro” kaj helpe de komuna lingvo feliĉe integriĝi laŭ sia kosma destino sur la planedo. Do, ek ĉiuj al laboro!

Universala Kongreso

Ekskursa Kongreso

■ Alessandro Amerio

La kongresaj ekskursoj estis entute 30 kaj daŭris de la 24-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto.

Ili tuŝis 7 italajn regionojn kun vizitado de konataj kaj nekonataj artaj urboj kaj vilaĝoj ĉe montoj, montetoj, maro kaj lago.

En ili partoprenis 1122 personoj kaj ĉiuj kiuj partoprenis revenis feliĉaj. Estis nur eta akcidento okaze de la bicikla ekskurso, bonŝance sen gravaj konsekvencoj.

Ĉiuj planitaj ekskursoj ekiris kaj revenis pli-malpli akurate kaj ĉiuj antaŭviditaj servoj (manĝoj, vizitoj al monumentoj ktp.) estis regule liveritaj, escepte de la vizito al Villa Della Regina okaze de la antaŭkongreso kiu okazis en Torino, ĉar la grupo malfruis kaj la loko jam fermiĝis. Tio estas sendube sukceso, se konsideri la fifamon de italoj pri akurateco kaj organiza kapablo. La nura vera “fuŝo” okazis dimanĉe matene, kiam la buso por la postkongreso ne prezentiĝis por porti la aliĝintojn al Verono. Sed pri tio ne respondicis la LKK, sed la vojaĝagentejo kiu organizis la antaŭkongreson kaj postkongreson. Ili tamen tuj solvis la

problemon kun limigitaj ĝenoj al la partoprenantoj. Problemetoj estis ankaŭ rilate aldonajn noktojn en Venecio, sed ankaŭ tiuj estis rapide solvitaj.

Mi povas taksi la ekskursan programon sukcesa kaj se mi devas serĉi malvirton, estis ke kelkaj ekskursoj estis iom tro plenaj de farindaĵoj kaj tio devigis la grupojn hasti aŭ malfrui.

Mi konkludas dirante ke la sukceso ŝuldiĝas grandparte al la profesieco de la lokaj gvidistoj kiuj enamiĝis al la Esperantaj grupoj kaj mirige kunlaboris, sed ĉefe pri ĉio mi devas danki kaj publike laŭdi la kongresajn volontulojn kiuj senescepte ludis sian rolon sindediĉe kaj zorgeme tiel ke ĉio nekredeble glate iris.



12 diplomoj pri Elstara agado kaj Elstara Arta Agado aljuĝitaj en Torino

En la Solena Fermo de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino estis anoncita la disdono de 12 diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado por la jaro 2023. La Diplomoj pri Elstara Agado estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Elstara Agado

1) Andrea Turrisi kaj Esteban Emilio Mosonyi (Venezuelo) pro sia longtempa agado kiel motoroj de la Esperanto-movado en Venezuelo ekde la sepdekaj jaroj kaj kiel fondintoj de Venezuela E-Asocio. Turrisi, vigla movadano, longtempa redaktoro de la revuo *Venezuela Stelo*, nuntempe loĝas proksime al Torino. Mosonyi, emerita profesoro de antropologio kaj lingvistiko en la Centra Universitato de Venezuelo, spertulo pri indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj, daŭre aktivas pri la rajtoj de la originaj popoloj de Ameriko. Li aŭtoras gravan verkon pri dek el la indiĝenaj lingvoj de Venezuelo kaj kuntradukis *Eta Selektajo de Verkoj de Bolivar*.

2) Espoir Ngoma Kasati (D. R. Kongo) pro la vasta instruagado de Esperanto en Afriko, surloke kaj rete, aparte en lernejoj de Uviro (D. R. Kongo) kaj en Tieso (Senegal), okaze de la preparoj por la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kaj pro la kontribuoj por starigo de junularaj organizoj kaj en Orienta Afriko kaj en Senegal.

3) Francis Hult (Usono) pro sia agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiel reprezentanto de UEA kaj kiel prezidanto de la novkreita Komitato pri Lingvoj kadre de la Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO), organizinte interalie gravan kunsidon pri multlingveco en UN, en kiu estis egale uzataj la ses UN-lingvoj kaj Esperanto.

4) Mana Brinson Namutema (DR Kongo) pro la organizado de la movado en regiono malstabla pro milito, pro partoprenigado de junuloj en afrikaj E-eventoj (aparte pri dekoj da junuloj al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Burundoka, Burundo) kaj pro la konstruo kaj tenado de Es-

peranto-domo por akcepto kaj edukado de infanoj, inkluzive kun enplekto de neesperantistoj, asistado, alfabetigo kaj instruo de Esperanto.

5) Manuela Burghilea (Rumanio) pro la valora volontulado ĉe Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), pro la agado kiel motoro en diversaj aktivajoj de TEJO mem kaj pro la laboro kiel unu el la ĉefaj agantoj ĉe Tutmondaj Voĉoj (Global Voices en Esperanto), subtene al la aperigo de gazetaraj artikoloj serve al diversaj lingvo-grupoj, aparte al indiĝenoj, minoritatoj kaj enmigrintoj.

6) Nisinaga Atusi (Japanio) pro la elstara agado kiel prezidanto de la Komisiono pri Azia kaj Oceania Esperanto-Movado (KAOEM) kaj kiel vicprezidanto de Japana Esperanto-Instituto, gvidante en la komisiono 14 landajn reprezentantojn kaj respondekante pri sukcesa okazigo de la 10-a Azia-Oceania Kongreso en Busano (Koreio).

7) Pascal Dubourg Glatigny (Germanio) pro la ampleksa agado en la Komisiono pri Financo de UEA, pro la esencaj kontribuoj al la efektivigo de la konservo de la Arkivo de UEA ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj de la Biblioteko Hector Hodler ĉe la Pola Nacia Biblioteko kaj pro la akademia agado pri Esperanto, interalie pro la kunorganizado de multlingvaj renkontiĝoj kaj seminarioj. Li lastatempe verkis la antaŭparolon por la romano *La horo 25*, publikigita en 2022 en la serio Oriento-Okcidento de UEA.

8) Aŭstria E-Asocio (Aŭstrio) pro la longdaŭra okazigo de somerkursaroj kun partoprenantoj kaj gvidantoj el diversaj landoj kaj kontinentoj kaj pro la daŭra serio de konstantaj retprelegoj dum kaj post la pandemio.

Elstara Arta Agado

1) Miguel Fernández Martín (Hispanio) pro la plurjara konscienca prezidado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj aliaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri poezio, tradukoj, muziko kaj komentarioj. Lia brila plej nova verko *Omaĝe al Lorca* enhavas ne nur tradukojn de poemoj de la plej konata hispana poeto de la dudeka jarcento,

sed riĉajn notojn, klarigojn kaj komentariojn por gvidi la legantojn en formo ankoraŭ ne atingita en tia verko en aliaj lingvoj.


2) Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) (Hispanio) pro la plurjara sekretariado de la Belartaj Konkursoj de UEA

kaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri verkado, eldonado, tradukoj, filmado kaj muziko. Li pionire eldonis scienc-fikciajn seriojn kiel Sferoj, Orbito nula kaj Future, antaŭenigis en Esperanto la ĝenron mikronovelo, redaktas kaj publikigas artajn filmmaterialojn kaj lastatempe agadas por renovigo de muziko en Esperanto, per konsilado, intervjuoj, tradukoj de kantoj kaj subteno al novaj talentoj.

3) François Randin (Svislando) pro la longtempa agado kiel filmisto en Esperantujo, kun produktado de pli ol 20 filmoj, kelkaj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Li

starigis en Laŭzano (Svislando) la filmkompanion Nandir por Esperanto-filmoj. Inter liaj premiitaj filmoj estas: *La ega kesteto* kaj *La Verda Stelulo*.

4) Helga Plötner (Germanio) pro la konstanta sindediĉo al la pentrado de famaj esperantistoj kun ampleksa rigardo al la internacia komunumo kaj ĝia diverseco. Ŝi jam aperigis 6 librojn, nome la serion Esperanto por mi, en kiuj ŝi pentris po 16 esperantistoj por libro, plus nuntempe pentritaj aliaj 4 por nova sepa volumo, entute jam produktinte 100 portretojn de esperantistoj kun biografioj.



Se vi deziras konatiĝi kun ĉefverkoj de diversaj naciaj kulturoj, legu la librojn en la Serio Oriento-Okcidento.

Vidu liston ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento

Sekvu kaj abonu la Gazetarajn Komunikojn de UEA por informiĝi pri freŝaj novaĵoj ĉe:

<https://uea.org/aktuale/komunikoj>

Forpaso

Ralalarisoa Justine
(09.02.1954 – 20.05.2023)

Ralalarisoa Justine (Lala), eks-komitatano de Universala Esperanto-Asocio, post mallonga malsano forpasis la 20-an de majo 2023. Ŝi naskiĝis la 9-an de februaro 1954, kaj profesie es-

tis instruistino ĝis emeritiĝo. Lala en sia vivo ankaŭ aktivis en la Esperanto-movado ĝenerale kaj aparte en la kontinenta. Ŝi estis membro de la Afrika Komisiono kaj laste, antaŭ sia morto, ŝi




ege helpis en la eduka agadkampo por apero de junaj novaj fortoj en Madagaro. Ŝi estis ankaŭ fakdeligito de UEA kaj inter 1998 kaj 2019 vojaĝis unufoje jare kaj partoprenis plurajn kunvenojn pri Esperanto en Francio kaj ĝenerale en Eŭropo.

Pro siaj meritoj al la Esperanto-movado, Ralalarisoa Justine restas en memoro de esperantistoj.

109-a Universala Kongreso de Esperanto Aruŝo, Tanzanio

3 – 10 aŭgusto 2024



**La Universala Kongreso de Esperanto venos al Tanzanio!
Aliĝu al la 1-a UK en Afriko: uk.esperanto.net/2024**